

BULGARA ESPERANTISTO

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO KAJ DE LA BULGARA ESPERANTO-INSTITUTO

Препорчано отъ Министерството на Народната Просвѣта за училищнитѣ библиотеки съ окръжно № 1870 отъ 27 януарий, 1922

Jarabono: 20 bulgariaj levoj | 1 levo je kvadrata
1 sv. fr. aŭ egalvaloro | 2 levoj je kvadrata
Agreso: Sofio. Poŝtkesto 233 | Redakto: Sim. St. Hesarčiev

Verziffen: Jg. 14, Nos 7 bis 8 Ende!

Esperanto kaj la lernejo

Antaŭ 45 jaroj multaj entuziasmaj adeptoj de „la nova internacia lingvo“ opiniis, ke tuj la tuta mondo akceptos kaj ekparolos ĝin. Unue ekuzis ĝin filatelistoj, al kiuj Esperanto servis bone kaj idealistoj. Iom post iom oni aplikis ĝin en literaturo, en poezio, en scienco, sekvis la praktika uzo, kiu eĉ nun igas multajn miregi. Dum tiu ĉi somero francaj gesamideanoj vizitis la ministerion de fervojoj. Oni unue ne komprenis kaj miris, ke ni penas interkompreniĝi en Esperanto. Sed la vivanta praktiko bone efikis. La sama oficisto konservis bonegan impreson pri la servemo de la esperantistoj kaj pri ilia solidareco kaj nun estas granda amiko de Esperanto.

Ĉiu jaro alportis kaj alportas plian venkon kaj uzon de Esperanto. Ni jam konstatis, ke en multegaj okazoj la modernaj lingvoj ne utilas tiom, kiom utilas Esperanto.

Jam delonge Esperanto eniris lernejojn kaj universitatojn. Ankaŭ ĉe ni oni instruis ĝin antaŭ deko da jaroj. La rezultoj dum

nur mallonga tempo ne estis brilaj, sed ni jam enregistris tion en la historio de la bulgara esperantista movado. Venis atakoj, malhelpoj, malfavoro. Esperanto en la lernejoj dormetis. Nun ĝi denove revekiĝis kaj tion provas la kursoj en multaj gimnazioj dum la pasinta kaj kuranta jaroj.

Pri la utileco de Esperanto por la gelernantoj dubas nur tiuj, kiuj ne konas ĝin teorie kaj praktike. Estas tre facile kompreni, ke la simpla korespondado donas multajn konojn pri geografio, historio, literaturo, popolvivo, lingvoj k. t. p. k. t. p. Kaj tio estas nur la unua paŝo, kiu ne estas lasta. Unu esenca diferenco ekzistas ĉe la metodo de la teoria lernado de Esperanto kompare al aliaj lingvoj; Dum ĉe la lastaj (krom se specialistoj tion faras) oni ellernas difinitajn kaj rigidajn formojn, kiujn oni devas scii sen multa rezonado, en Esperanto oni lernas regulojn, principojn kaj elementojn. Ĉion plian oni mem kombinas. Tiel riveliĝas la aktiva partopreno en la uzado kaj kreado de la lingvo

703.453 - C. Gosp.
14-15
1932/33 - 1933/34

La 19-a kongreso de BEA

Inter ĉiuj landaj esperantistaj organizoj nur malmultaj havis tiom da kongresoj. Jam multaj jaroj pasis kaj multaj personoj laboris de post la unua Bulgara Esperantista Kongreso, kiun vizitis 20—25 personoj.

La 19-a kongreso de BEA okazis je la 14.—15. Aŭgusto 1932 en unu el la aŭditoroj de la Libera Universitato.

La 13-an (sabate) okazis komuna vespermanĝo en la vegetara restoracio sur str. „6 septembro“ kiu daŭrigis en restoracio „Elit“ post la akcepto de la rumanaj gastoj.

La 14-an matene malfermis la kongreson la prezidanto de BEA s-ro Aktarĝiev. Bonan impreson faris la fakto, ke malgraŭ la krizo oni vizitis la kongreson mult-

(ĉiu parolanto kreas la lingvon). Oni analizas kaj rezonas legante kaj ĉiam oni demandas sin: kial tio estas tiel? Kial ne alie? Kion ĝi signifas? Ĝiaj samsignifaj? k. t. p. Tiel ekzemple volante esprimi „instruistino“ oni unue analizas tiun ĉi ideon: virino; ŝia laboro estas instrui; tio estas ŝia profesio kaj ni kombinas la vorton por esprimi tiun ĉi ideon el la vortoj: instrui, ist, in kaj o: instruistino. La konscia lernado de Esperanto do estas ĝia granda avantaĝo kaj helpo por la lernado de lingvoj ĝenerale. Kiam ajn, kaj ni esperas baldaŭ, oni taksos tion kiel ĝi meritas kaj oni uzos ĝin en la lernejoj.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankigante

Ni iru la vojon celitan!

La estonto apartenas al ni.

Sim. St. Hesapĉiev

nombre!

La estraro de la kongreso konstituiĝis jene: prezidanto: s-ro P. Jordanov (Sofia), vicprezidantoj: H. Fiŝer (Bukureŝto), Triĉkov (Vraca), Lupov (Pazarĝik), kaj sekretarioj: d-ro Velkov (Vidin) kaj Ignatov (v. Hajredin).

Oni legis la salutojn el multaj lokoj enlande kaj eksterlande. Specialan salutparoladon faris s-ro Patev—prezidanto de „Rodno Radio“, kiu deklaris ke „Rodno Radio“ per Esperanto kaj Esperanto per „Rodno Radio“ plifaciligas sian agadon.

Posttagmeze la kongresanoj faris komunan ekskurson al la banloko „Bankja“.

Je la 15-a matene la sekretario—samideano Sim. Hesapĉiev, raportis pri la agado de la Centra Komitato. Post tio la prezidanto de la Kontrola Komitato—s-ano Dim. Simeonov donis sian raporton.

Sekvis diskutoj pri tio kaj la tuta kongreso unuanime liberigis la CK de plua respondeco.

Posttagmeze prelegis pri „Internaciaj rilatoj kaj internacia mono“ s-ano Harbaĝiu el Bukureŝto. La bone konata s-ano Fischer (ankaŭ el Bukureŝto) parolis pri temo: „Enkonduko kaj oficialigo de novaj vortoj“. S-ano Hesapĉiev daŭrigis pri la sama temo, subtenante la opinion, ke multajn el la novaj vortoj oni povas forĵeti kaj anstataŭi per pure esperantaj. Li donis ekzemplojn pri la formado de la vortoj en Esperanto kompare al aliaj lingvoj.

Oni decidis, ke la 20-a kongreso de BEA okazu en Ruse. Ĝin vizitos rumanaj gesamideanoj kaj post tio la bulgaraj geesperan-



La 25-a Universala Esperanto-Kongreso

La 25-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Köln (Germanujo) de 29 Julio ĝis 5 Aŭgusto 1933 j.

Köln estas fondita de la Romanoj en la jaro 38 a. Kr. en la koro de Eŭropo apud la riverego Rejno.

Mondfama pro sia gotika katedralo, sia parfum industrio kaj multaj antikvaj kaj novtempaj vidindaĵoj kaj siaj kvar feraj pontoj super Rejno.

La Kolonjanoj estas precipe konataj pro sia sangvina temperamento kaj bonhumoro en bonaj kaj malbonaj tempoj.

La adreso de la L. K. K. estas: 25 Universala Kongreso de Esperanto Trajanstr 25 Köln Germanlando.

Kotizoj: Por faciligi al aliĝon al la kongreso kaj kun la celo plej eble fruigi la aliĝon kaj simpligi la preparlaboron, la LKK decidis akcepti ĉiujn aliĝojn ĝis inkluzive 31, 12 1932 je favorkotizo de nur gmk. 18 — post 1. 1. 1933 validos la plena kotizo de gmk. 20 —

Blinduloj kaj ties gvidantoj rice-

tistoj gastos en Bukureŝto.

La kongresanaro elektis la jenan novan estraron: CK: G. Aktarĝiev, At. D. Atanasov — Ada, Simeon St. Hesapĉiev, Petr Jordanov, Dim. Stojanov, Dim. Simeonov, K. Georgiev kaj KK: s-ino Berta Marinova, Iv. Dobrev kaj St. Masâ-ov.

S-ro Popoviĉ, direktoro de la Komerca Cambro en Bukureŝto dankis pri la bona akcepto en Bulgarujo kaj deklaris, ke li ĉie propagandos Esperanton.

La vicprezidanto de la kongreso s-ano Triĉkov fermis la kongreson kun kelkaj paroloj kaj post tio ĉiuj kantis la himnon.

vos kongreskarton senpage.

Donacoj por la kongresa kaso estas danke akceptataj.

Ĝis septembro anoncis sian aliĝon 103 personoj de 15 landoj.

La Esperanta filmo pri Kolonjo, urbo de la 25-a Universala kongreso de Esperanto, montrita en Parizo, ricevis multajn aprobojn, kaj sekve de tio la LKK interkonsente kun ICK decidis rondirigi la filmon tra Eŭropo. La klarigoj estas en Esperanto. Laŭ la plano de ICK la filmo estos en Bulgarujo dum la tuta monato Februaro 1933. La filmo estas 415 metrojn longa. Por la montrado de la filmo oni ne pagos. Nur la sendkostojn devas surprizi la apartaj societoj. La detalan programon ellaboros la CK. Ĉiu societo tamen devas garantii, ke ĝi gardos kaj konservos la filmon sendefekta.

El la C. K.

La CK sendas alvokon al ĉiuj senprokraste sendi la abonojn. La societoj kaj apartaj samideanoj pagu la kotizojn jam en la komenco de la asocia jaro. Subtenu la organon, kies aperon vi atendas senpacience!

La societoj post elekto de estraro tuj sciigu ĝian konsiston kaj la adreson por korespondaĵoj.

En multaj lokoj la societoj dum la pasinta jaro faris preskaŭ nenion. Samideanoj, plivigliĝu! Esperanto estas survoje al la lernejo. Ne preterlasu la okazon, ke ĝi estu en la lernejo. Tion ni atingos per komunaj fortoj kaj sistema agado.

Съ, или безъ винителенъ падежъ?

Случаитѣ, които ще разгледамъ тука сж особени и отъ естество да заблудятъ не само начеващитѣ, но и напредналитѣ. Знае се, че винителниятъ падежъ се употрѣбява, за да покаже прѣкото допълнение тамъ, гдето има две лица — едно, което действува и друго, върху което пада действието. Второто се поставя въ винителенъ падежъ—то е прѣкото допълнение.

Въ случаитѣ, които ще разгледамъ имаме сжщо така форми произходящи отъ преходни глаголи (такива, които иматъ прѣко допълнение).

Наставкитѣ и представкитѣ на Есперанто сж различни по значение и употрѣба: *mal*, *ist*, *ag*, *ul* и т. н. Нѣкои отъ тѣхъ се употрѣбаватъ при сжществителни, други при прилагателни, трети при глаголи, или пѣкъ при пѣрвитѣ и вторитѣ и т. н. и то, като винаги се стремимъ да получимъ нови форми съ логическо значение.

Нѣкои наставки се употрѣбаватъ предимно и главно при глаголи. Такива сж: *ad ebl*, *em ig*, *iĝ*, *il*, *ind*. Отъ тѣхъ нѣкои се употрѣбаватъ *само при преходни глаголи*. Тѣ сж *ebl* и *ind* (*ig* сама образува преходни глаголи). При тѣхъ могатъ да се прибавятъ и причастнитѣ наставки *at*, *it ot*, съ които се образуватъ страдателни причастни форми.

Така казваме и образуваме формитѣ:

La akvo estas trinkebla = Oni povas trinki ĝin.

La ekspozicio estas vidinda = Ĝi meritas, ke oni vidu ĝin.

La libro estas legata (*lta*, *ota*) = Oni legas (is, os) ĝin.

Отъ тѣзи примѣри се вижда, че ако не употрѣбимъ тѣзи наставки, можемъ да изразимъ сжщото описателно и понеже употрѣбяваме преходенъ глаголъ, имаме прѣко допълнение.

Мислената връзка между еднитѣ примѣри и другитѣ кара мнозина да употрѣбаватъ винителния падежъ тамъ, кждето не трѣбва. Така подъ влияние на формата „*mi skribas ĝin*“ употрѣбаватъ *tio ĉi estas skribitan de mi*; подъ влиянието на формата „*mi legas la libron*“ употрѣбаватъ: „*la libro estas legatan de mi*“ или пѣкъ: „*la libron estas legata de mi*“.

Докато въ едната редица примѣри имаме преходни глаголи, които изискватъ винителенъ падежъ, въ другата имаме само прилагателни произведени отъ преходни глаголи, но свързани съ глагола „*esti*“, който (всички знаятъ това) е само спомагателенъ и не изисква винителенъ падежъ.

За случаитѣ, при които се употрѣбява винителенъ падежъ само отъ страхъ да не би да се пропусне, нѣма да говоримъ.

Нужно е по-дълбокo вникване и вглеждане въ формитѣ, за да разберемъ да употрѣбимъ ли винителенъ падежъ или не. Нека да следваме обаче правилото: въ съмнителни случаи (а за новитѣ есперантисти тѣ сж много) е по-добре да не се употрѣби винителенъ падежъ, отколкото да се употрѣби неправилно.

С. Ст. Хесанчиевъ

Paĝu vian abonon!

B. Bakalov

El „Nekrologo“

Mi staras senparola, korrompите,
 Mi staras kaj soif' en brusto varma
 Doloron akran kaŭzas, kvazaŭ spite;
 Mi kiskaresas viajn lipojn ĉarmajn.

Vi dronis, jes, en bonodoraj floroj.
 La ĉerkon vian superŝutis or'.
 Mi kisas viajn lipojn, mia kara,
 Por ĉiam fugis vivo, fugis for'!

Ĉu blankspirito via ĉirkaŭsvebas
 Inter la parfuma flora ond' —
 Aŭ ĝi senparola vage flugas
 Al la nekonata, fora mond'?

Ĉu vi ne eksentis, forirante,
 Kia nokt' sin sternis super ni?
 Domon mian Mort', preterpasante,
 Unue ĝi kial ne forigis min?

Respond' nenia. Nur kandelo flagras.
 mi staras ĉe la ĉerko — en brusto dolor'.
 Kaj je lasta foj' mi lipojn viajn kisas.
 Filin', vi restas nura rememor'.

El bulgara lingvo
 tradukis: Kr. Georgiev

D. Gimiĝiski

Rememoro

Somero. Nokto. kapon, li rakontas:

La kazino estas malplena. La blankaj tukoj de la regule ordigitaj tabloj reflektas la lumon de diverskoloraj lampoj kaj laŭtparolilo plenigas la salonon per molaj sonoj de malproksima kaj ĉarma tango.

Silente ni sidas, mi kaj mia amiko Statelov en la fundo de l'salono transportitaj en rememorojn kaj meditojn.

Per senbrua kaj mallaŭtigita voĉo, klininte en senforteco sian

— Aŭskultu Vanja! Io min turmentas! Ĝis doloro, ĝis larmoj io turmentas min kaj mi vane perfortas miajn nervojn por ne malkaŝi tion, kio estiĝas en mi mem. Unu peko simile al kolosa granita bloko premas mian bruston kaj mia kapo estas plena je blanka brulkarbaĵo, kiu bruligas kaj cindrigas ĉion. Ĉu vi scias kio estas peko? Teruraĵo! La rememoro pti ĝi estas eĉ pli terura ol la akto mem de ĝia faro.

La rememoro! Ĝi alvenas subite, invadas en vian penson kaj vi estiĝas sovaĝa besto, kiu mem disŝiras sin.

Mi rememoras — tio okazis dum la mondmilito.

Jus mi finis ŝtatan ekzamenon kaj atendis mian oficdonon kiel instruisto ie en la provinco. Mobilizo irigis min tien, kien iris ĉiuj. Tiam mi estis junulo malkvieta kaj mi akceptis la militon senadmire, sed ankaŭ senmalbene. Ne gravas. Ni vidu ankaŭ ĝin!

Tutan jaron mi pasigis en la zono de senĉesa tambura fajro, ĝis mi ricevis ofican komision lerni germanan maŝinpafilan kurson en urbo P.

La trankvila vivo malproksime post la fronto baldaŭ deviŝis de mia konscio la memoron pri la pozicio. La terura krakado de l' kanonegoj alflugis al mi kiel malproksima eĥo kaj la tagoj forkuris trankvilaj kaj kvietaj. Hazardo konatigis min kun juna kaj ĉarma knabino. Ŝia patro estis kolonelo, kaptita de aŭstrianoj kaj forportita en Viena militkaptitejo. Jam forpasis dek monatoj kaj ili ankoraŭ ne havas informon pri li. La saman vesperon ĉi tiu knabino haltigis min surstrate kaj honteme petis min, ke mi diru al ŝi kiel sendi leteron al la patro per la Ruĝa Kruco kaj poste mi ekdeziris akompani ŝin ĝis la hejmo. Ekde tiu ĉi vespero ni rekontiĝadis ĉiutage, parolis, ridis kaj promenis sur la stratoj. Estis vanaj la larmoj de ŝia patrino kaj la timigaj leteroj anonimaj de ŝiaj samnacionoj. Nenio povis forigi ŝin de mi. Ŝi min amis! Miaj estroj ankaŭ ne estis kontentaj pri ĉi tiuj rekontiĝoj. Ili ektimis spionadon kaj mi devis multe preparoli, por konvinki

ilin, ke tiu ĉi timo estas senbaza. Ni amegis unu la alian kaj neniam menciis la vortojn: milito kaj malamiko!

Post nelonge komencis alveni maltrankvilaj informoj de l' suda fronto. La famo, ke nia kurso estas fermota kaj ni denove iros al la fronto estiĝis ĉiutage pli certa kaj insista.

Disiĝo! Ŝi estis nekonsolebla antaŭ tiu ĉi penso kaj mi estis malforta por trankviligi ŝin, ĉar ankaŭ mi ne estis trankvila.

Unu vesperon, kiam mi legis en mia loĝejo la poemetojn de Baudelaire ŝi alvenis. Alvenis kaj senparole, senbrue min petis, ke mi prenu ŝian donacon kiel memoraĵon. Ŝi donacis sin mem! Ĉi vespere ŝi fordonis sin mem al mi!

Sed en la suda fronto la situacio pliboniĝis. La fronto estis denove fortigita kaj pezaj trajnoj militaj senĉese rampis al ĝi. Oni ne fermis la kurson kaj ni restis en la urbo.

Kiom pli bele estus, se mi estus foririnta al la pozicio! En mia konscio tiu ĉi knabino estus kunigita por ĉiam kun plej belaj rememoroj. Sed tio ne okazis kaj niaj renkontiĝoj daŭrigis. Mi jam ofte kondukis ŝin en mian loĝejon kaj baldaŭ ekrigardis al ŝi preskaŭ kiel al tiuj knabinoj, kiuj ĉiuvespere ĉirkaŭante nian klubon, konsentis esti kondukataj de niaj kaj germanaj oficiroj en loĝejon. Mi sentis kiel amego al ŝi rapide estingiĝis. Mi ne povis travidi tra ŝia oferaĵo esprimon de senlima amo kaj ne pripensante multe mi puŝis ŝin malsupren. Unu vesperon ŝi venis en mian ĉambron morte pala. Mi antaŭsentis, ke okazos io malforta. Ne salutante min kiel

ĉiufoje, ŝi ĉirkaŭprenis mian kolon — per siaj brakoj kaj kun larmoj malkaŝis al mi, ke ŝi estis graveda. Mi trankviligis ŝin per miaj amikoj—kuracistoj kaj ree ni restis ĝis malfrue. Du semajnojn post tio, ŝi ree min petis por helpo. Mi promesis al ŝi, sed faris nenion.

Kaj la tempo forkuris...

Ĵajnis al mi, ke tio estas ludo, kiu tudas al mi kaj mi decidis ĉesigi ĝin. Mi decidis ne allasi ŝin en mian ĉambron!

Estis vintra vespero, kiam ekstere furiozis terura ventego kaj mi venis ebria kaj kolera, ĉar subleŭtenanto Dietrich forpenis mian tutan salajron per pokerludo. Mi ŝin trovis en mia ĉambro!

— Kial do ci alvenis?

— Kolja, karulo, amata Kolja, vi trovis kuraciston, ĉu jes? Vi helpas al mi, ĉu jes? Ne pro mi mem, Kolja, pro la honoro de mia familio, helpu al mi Kolja! Ankaŭ vi havas fratinon Kolja, pro ŝi helpu min!

— Kion do ci volas de mi? Kiu scias kun kiom da aliaj ci dormis kune kaj jen nun ci venis ĉe mi plori?

Nenio min interesas. Mi turnis min al la muro. Ŝia ploro ĉesis. Ŝi iris al la pordo, malfermis ĝin kaj diris:

— Adiaŭ Kolja! Jam neniam mi vin maitranksviligos! Mi faris ĉion, ĉar mi vin amegis! Pardonu min! Ankaŭ mi vin pardonas!

Ŝi eliris trankvila kaj fiera.

Je la tagiĝo, kiam mi estis ankoraŭ en la lito, oni sciigis min, ke la knabino ŝetis sin de l' fera ponto en la riveron kaj dronigis sin.

Nur la hazardo, ke en mia

pistolo mankis kartoĉoj ebligas al vi sidi nun kune kun mi ĉe tiu ĉi tablo. Alie mi certe estus mortiginta min.

Mia restado en tiu ĉi urbo estis malebla. Mi transdonis raporton por reveni en mian regimenton. Oni plenumis mian peton kaj post unu semajno mi estis denove tie.

Vere neniu kulpigis min pro farita krimo, sed kredu, ĝis nun mi ofte vidas mian ĉambron, mi vidas ĉi tiun ĉambron kaj ploras...

Kaj nokte en sonĝo mi etendas brakojn, kvazaŭ mi ĉirkaŭprenas iun kriante terurigita:

— Anĝelika, ne ŝetu vin!...

Li ĉesis. Liaj fingroj frapis nerve sur la tablo. Du grandaj larmoj falis sur la plankon.

Tradukis: *N. Vasilev*

Пропагандна седмица

Централният комитетъ на БЕС въ едно отъ последнитъ си заседания реши да обяви за пропагандна седмицата отъ 4. декемврий т. г.

Презъ тази седмица да се уредятъ сказки, утра, вечеринки, изложба на картички, на списания, на книги и т. н. Тамъ, кждето липсватъ опитни дейци, да поискатъ упжтвания отъ ЦК. Нека пригответленията не се отлагатъ, за да може въ този день въ цѣлата страна да се прояви сдружената воля на българскитъ есперантисти.

За пропагандата да се използва и мѣстния печатъ.

Varbu abo- nantojn!

D-ro rabeno Hananel Jozef la ĉastulo

Ne sen interna penso kaj batalo la malfeliĉa sklavo Jozef sukcesis forsavi sin el la manoj de la edzino de Potifar, ĉar ŝi volis amforlogi lin per ĉiuj rimedoj. Kiam li leviĝis por forkuri deapud ŝi, ŝi kaptis la baskon de lia vesto; de tiu arda ŝia deziro malforteco ekposedis lin kaj li preskaŭ estis cedonta. Sed en tiu momento li vidis en sia imago la figuron de sia patro, kiu diras al li: „Venos tempo, kiam la nomoj de ĉiuj fratoj estos enĉizitaj en multekastajn ŝtonojn kaj la pastrojn portados ilin sur sia brusto. Ĉu cia nomo devas esti forgratita“? Tiam la malbona spirito — tentanto rorlasis lin; li lasis sian palton en la manojn de sia tentantino kaj forkuris.

La tentanta virino, edzino de Potifar ne sendis tuj sian sklavon en la malliberejon. Ŝi volis ankoraŭ ĝui la belecon de Jozef kaj esperi.

Sed en la urbo Memfis, inter la gekorteganoj disvastiĝis famo pri la okazintaĵo. Kun specifa plezuro la korteganinoj klaĉadis, kontraŭ la edzino de la servanto de l'faraono.

Foje la edzino de Potifar invitis gaste la korteganinojn kaj al ĉiu el ili ŝi proponis senŝeligi oranĝon. Ŝi promesis oran ringon, kiel premion al tiu, kiu sukcesus senŝeligi la oranĝan unue. Kiam la korteganinoj estis okupataj pri la senŝeligo, ŝi faris signon al sia sklavo Jozef kaj li eniris en la gastĉambbron. Ekvidinte Jozefon, la korteganinoj ekmiregis lian belecon, fiksis siajn rigardojn al li kaj daŭrigis senŝeligi la oranĝojn. Ĉiu el ili tranĉvundetis sian fingron kaj forviŝis la sangon per la tuketoj, kiujn la edzino de Potifar pretigis

La jubileo de Maksim Gorkij

En la nunjara aŭtuno finiĝas 40 jaroj da literatura agado de la mondfama verkisto Maksim Gorkij, kies vivo kaj verko, nedisigebla tuto, egale vekas ĉies admiron.

M. Gorkij estas unu el la maloftegaj ekzemploj en la mondhistorio, kiam homo elveninta el la fundo mem de l' vivo, tie, kie homo kaj besto kunfratas, atingas plej altan nivelon de kulturo kaj socia pozicio.

Kvardek jaroj da obstina kaj sindona laboro en la kampoj, literatura kaj socia, karakterizas la personon de M. Gorkij kiel unu el la plej talentajn kaj noblajn idojn de l'homaro. Liaj verkoj, romanoj, noveloj kaj dramoj, plenigitaj de tiom da homamo, homeco kaj vereco disvastiĝis tra la tuta terglobo kaj gajnis la korojn de la legema publiko. Lia partopreno en la sociaj bataloj ĉiam kaj ĉie ĉe l'flanko de l'justeco starigis lin en la vico de la plej konsciencaj homoj kiujn nutris la granda tero.

Nun kiam la tuta progresema mondo festas la altmeritan jubileon de Maksim Gorkij ni la esperantistoj, ankaŭ ŝuldas al li sinceran honoron kaj varmajn simpatiojn des pli ke li elmontris sin kiel arda defendanto de nia lingvo.

J. St.

al ili. Ŝi kolektis la sangmakulitajn tukojn kaj konservis ilin kiel pruvon, ke en la sama okazo ĉiuj korteganoj ne povus agi alle ĉe Jozef.

el la bulgara: S. St H.

Sim. St. Hesapčiev

Mia 24-taga propaganda vojaĝo tra Bulgarujo

Dum la pasinta agadjaro mi havis okazojn viziti kelkajn lokojn de la lando kun propaganda celo kaj mi konstatis, ke tio estas necesa en multaj lokoj ankoraŭ kaj mi vidis la deziron de samideanoj el diversaj lokoj viziti ilin. Jam dum la somero mi difinis la vizitotajn lokojn kaj la tempon dum kiu mi vojaĝos. En la fino de la somero mi jam intertraktis kun samideanoj el ĉiuj lokoj kaj je la 16-a de septembro mi komencis mian vojaĝon.

El Sevlievo mi devis viziti unue vilaĝon Bela-Ĉerkva, sed ĉar estis tro frue pro la multega kampa laboro, tie oni ne aranĝis paroladon. Je la 17-a en bela freŝa mateno mi envagoniĝis de Pavlikeni al Gorna-Orehovica. Tie mi faris paroladon dum la vintro kaj tial mi devojiĝis dum kelkaj horoj. Min akceptis la juna kaj vigla propagandisto kaj kursgvidanto s-ano Jordan Stanev k. a. Ĉe la stacia kvartalo kaj en vilaĝo Kaltinec, kie oni fondis societon post mia parolado, mi vidis multajn samideanojn novajn kaj kelkajn malnovajn. Vigla esperantista vivo bolas en tiu grava fervoja centro de nia lando. Post vizito al kelkaj samideanoj forpasis la mallonga difinita por restado tempo kaj la rapida vagonaro ekportis min al Bjala jen inter serpentumanta arĝentstria Jantra, jen malproksime de ĝi tra la Nordbulgara ebenaĵo inter belaj, dronantaj en verdaĵo vilaĝoj inter fruktoplenaj vinbergardenoj kun jam maturaj vinberoj.

Ce stacio Bjala min renkontis s-ano Sava Altimirski kun kelkaj samideaninoj. La urbo estas 7 kilometrojn malproksime de la fervoja stacio. La aŭtomobilo pasas sur la plej longa en Bulgarujo ponto (super Jantra) unu el kies partoj estas tre malnova kaj kun specifa arkitekturo. La rivero ĉiam plivastigas sian liton kaj oni kelkfoje alkonstruis la ponton. Nun sub la ponto malvigle fluas la malmulta akvo de Jantra. Tiu ĉi kampara urbo situas sur du montetoj, kaj inter ili la atmosfero estas senmova, sufoka kaj polvoza. En la norda parto de la urbeto estas rememora parko pri la liberiga milito. Ĝi similas tiun en Pleven, sed estas malpli granda kaj vera oazo en tiu ardanta pro malsekeco urbeto. Ni vidas armilojn, kostumojn, boatojn, ŝipojn — ĉio memorigas la epokon antaŭ iom pli ol duona jarcento.

Post komuna promeno kaj vesperdistro matene ni aranĝis la unuan paroladon por ĝenerala publiko. Posttagmeze ni promenas en la ĉirkaŭaĵoj de Bjala kaj vizitas la vinbergardenon de samideanino Kasabova, kie ni manĝis ĝissate la aromajn kaj sukerozajn fruktojn.

La tago estingiĝas. Okcidento dronas en ruĝo ĉe la lastaj karesoj de la sunradioj, kiuj penetras tra la ege polvoza aero preter la ŝoseo.

Ĉar la matenon mi devis ekveturi tro frue, la vesperon mi foradiaŭis la gesamideanojn kaj noktis en malgranda gastejo apud

la stacidomo. En bela plenluna nokto ekmoviĝas malvige la miksita vagonaro. La tago alproksimiĝas. Pli klare kaj pli klare aperas montoj, arboj, kampoj... Denove en Gorna-Orehovica... Vagonaroj, fumo, vojaĝantoj, bruoj! Mi havas sufiĉe da minutoj por denove intervidi kun samideanoj.

Venas Tirnovo kun sia unika amfiteatra situo sur montoj kaj serpentumanta Jantra. Oni unue ne komprenas de kie venas la rivero kaj al kie ĝi fluas. Venas kaj forpasas Balkano kun la multaj tuneloj unu super alia. Facilaj lanugaj nubetoj ŝvebas en la serena ĉielo. Posttagmeze mi estas jam en Sliven. La fieraj bluaj ŝtonegoj senmove kaj fiksrigarde salutas. Mi gastas ĉe samideano d-ro St. Kadiev. La 20-an mi faris la plej bone vizititan paroladon en la bela salono de kulturkleriga societo (legejo) „Zora“. Ĉeestas pli ol 160 gelnantoj de la ambaŭ gimnazioj. La provleciono kaj la fakto, ke „ili parolas lingvon nekonatan“ enlogas la junajn korojn. La mallonga tempo, pri kiu mi disponas ne permesas al mi viziti la naturajn belaĵojn de Sliven kaj mi forsalutas la bluajn ŝtonegojn, promesante antaŭ mi kaj antaŭ ili duan fojon nepre viziti ilin.

La 21-an tagmeze mi estas en Jambol laŭ la difinita programo. Multaj samideanoj kaj samideaninoj. Denove venas rememoroj pri la bone pasigitaj tagoj de la postpaska konferenco. Tie ĉi mi faris du paroladojn ĉe la gimnazio — unu pri „la homa lingvo“ kaj duan pri Esperanto. Amike agrable forpasis du tagoj. Mi forsalutas s-anojn d-ro Z. Pas-

kalev, Aleksiev k. a.

Malproksime post mi restas Jambol kun sia bela ĝardeno kaj Tunĝa kun densa krono de maljunaj salikoj. Oriente post mi estas vidata nur la monto Sveti Spas. Ĉio dronas en tremanta malserena aero de la malproksimo.

Aro da samideanoj akceptas min en Nova-Zagora. Rememoroj pri bone pasigitaj 24 horoj dum la printempo nin ligas. Tie ĉi mi sentas min en tre intima kaj amika medio. Originalaj afiŝoj pri mia parolado (unu el ili kun mia portreto) estas elmetitaj en la ĉefa strato. Vespere mi faris mian publikan paroladon. En tre malvastan saloneton de la legejo enpuŝis sin apenaŭ 50 personoj. Sufiĉas, ĝi estu plena! Poste mi faris paroladojn en grandaj salonoj, sed kun malmultaj personoj. La sekvantan tagon antaŭtagmeze (24. X.) mi kaj s-ano Koljo Rusev vizitis s-ron direktoron de la gimnazio. Nova-Zagoranoj havas belan kaj grandan lernejon, kiun konstruigis ilia samurbano la eksministro de publika instruado — St. Omarĉevski, simpaticiulo de Esperanto. S-ro direktoro akceptis nin bone kaj restis tre kontenta post la parolado kaj provleciono.

Je la 25-a matene mi envagiĝas al Kirĝali tra Ziaten-Dol kaj Rakovski. Apud Ziaten-Dol la vagonaro pasas sur longa ligna ponto super Marica, veturante kun 5-kilometra pohora rapideco — la ponto estas tre elasta. Iom pli supre estas la nova kaj fortika ponto por veturiloj kaj piedirantoj. La plej granda rivero en Bulgarujo eĉ tie ĉi havas tro malmulte da akvo pro la longedaŭra sekeco. Mi

bedaŭras ke, la plej oportunan por parolado tempon — dimanĉe matene mi uzas por vojaĝi: tiel estas aranĝita la programo por ŝpari tempon.

Terura varmego kaj polvo! Tiu ĉi suda regiono ne vidis pluvon dum kvar monatoj. Laŭ antaŭa sciigo venas al la haskova stacidomo s-ano Delčo Haralanov. Li montras al mi la jam pretajn afiŝojn pri mia publika parolado kun alvoko al la esperantistoj en Esperanto.

— Ĝis la revido post du tagoj!

La vagonaro rapidas ĉiam al sudo. Mi jam estas en nova Bulgarujo. Granda diferenco en ĉio: tero, loĝantoj, mastrumo k. t. p. La regiono, kvankam montara estas preskaŭ tute nuda. Dum jarcentoj oni hakis senplane la arbarojn kaj nun staras alten nudaj rokoj. Ĉiam pli kaj pli sufoke.

Jen estas fine Kirĝali, situanta sur kaj inter montetoj kaj ĉirkaŭ ĝi pli aŭ malpli proksime aretoj da domoj kvazaŭ apartaj vilaĝetoj. Ĉe la stacidomo min akceptas kaj salutas deko da samideanoj. Inter ili estas la malnova pioniro Vasil Vaĉev, kiu multe laboris por la „komuna domo“ — salono kiu apartenas al tri kulturaj societoj en Kirĝali. La triono de tiu ĉi domo apartenas notarie al la esperantista societo „Stelo“ en Kirĝali. Pri tio ili povas fieri.

Kirĝali estas vigla kaj grandparte moderna urbo kompare al multaj urboj en malnova Bulgarujo. Nuntempe tamen ĝi fortege sentas la krizon ĉar la sola loka produktaĵo — la tabako estas treege malkara. Oni aĉetis de la produktintoj kilogramon

de ĝi je la prezo de 15 lv. ($\frac{1}{2}$ sv. fr.)!

Grandegaj afiŝoj antaŭ la teatra domo sciigas al la urbanaro pri la parolado, kiu okazis vespere. Matene ĉe la vekiĝo mi aŭdas la voĉon de la hoĝo (turka pastro) de la centra moskeo. Li alten sendas preĝon al Allaho pri favoro kaj bonfarto dum la tago. Laturk-oj preĝas kvin fojojn ĉiutage: matene, antaŭtagmeze, tagmeze, posttagmeze kaj vespere.

Mi promenas en la supra parto de la urbo. Mallarĝaj kaj malpuraj stratetoj, domoj kun malgrandaj fenestroj. La orienta kulturo daŭre konservas sian influon. Antaŭtagmeze mi vizitas la turkan lernejon. Ĝi estas granda kaj bela trietaĝa domo ankoraŭ ne finlaborita. Arkitekturo orienta kun la specifaj arkoj kaj fenestroj. Super ĉio fiere alte staras la duonluno. Mi vizitis lecionon pri kalkulado ĉe s-ano Hasan Ismailov kaj lecionon pri turka lingvo ĉe alia instruisto. Komparante la nunan staton kun tiu antaŭ la milito, oni konstatas, ke la turka edukado multege progresis. La viglaj kaj junaj instruistoj entuziasme kaj sindone laboras por la progresigo de sia renaskiĝanta popolo. Posttagmeze mi faris paroladon por gelnantoj. Vespere sufiĉe forta kaj longedaŭra tertremo timigis la loĝantojn. Tio estis la sama forta tertremo, kiu en Halkidika duoninsulo faris grandajn detruojn kaj multe da damaĝoj. Du aŭ tri postajn tremojn malfortajn mi eksentas dormante.

La 27-an frumatene mi ekveturas al Haskovo, forportante salutojn al ĉiuj samideanoj en malnova Bulgarujo. Hodiaŭ en

La Internacia Esperanto-Muzeo

„La internacia Esperanto-Muzeo (IEMW)“, fondita 1929 en Wien, konservas ĉiun materialon, kiu koncernas la „mondhelplingvan demandon.“

Ŝtata entrepeno, sed sub gvidado de la esperantistoj kaj je dispono de ili. Granda propagando por nia celoj

Jam vizitita de multaj eminentuloj kaj samideanoj el tutmondo

Protektoro la ŝtatsprezidanto de Aŭstrio

Pli ol 6000 libroj (inter ili la kolekto „Cart“ kun 1500 libroj), pli ol 1000 gazetjarkolektoj, 150 aperadantaj gazetoj.

La ŝtato disponigis belegan hejmon, bindigas la librojn ktp.

Helpu al la „Mekko“ de la Esperantistoj:

1. *Per aliĝo.* Ĉiu grupo estu „membro por 10 jaroj“

En ĉiu loko almenaŭ krom la grupo unu samideano estu „dumviva membro“.

La kotizo por ambaŭ estas po svis. Fr. 12 50 aŭ egalvaloro (ankaŭ pagota en 3 partoj.)

Ĉiu membro ricevos: Membrokarton; numeron de Aŭstria Esperantisto, en kiu estos publikita la aliĝo; 3 diversajn fotojn pri IEMW; 4 diversajn gvidfoliojn kaj ĉiam la novaperitajn de Aŭstrio; 64 paĝan ilustritan gvidlibron de Wien; dum vintro 1932/33. Adresaron pri Honora, Kuratora Komitatoj, ĉiuj membroj, grupoj ktp. kiuj aliĝis, kaj

Haskovo mi devas fari du paroladojn. Mi vizitas la direktoron de la gimnazio s-ro Dobri Hristov — iama esperantisto.

(Sekvos.)

ĉiujare „Aldonojn al Adresaro“ (novaliĝintoj, adresanĝoj): por novearbita membro Esp. libron.

2. *Per sendado* de materialo: libroj, broŝuroj, statutoj, manuskriptoj, presajoj ĉiuspecaj, la tuta materialo de intern, kaj landaj kongresoj, leteroj kaj fotoj de eminentuloj, fotoj de grupoj, ekspozicioj ktp. IEMW kolektas la presajojn en Esperanto aŭ iu ajn sistemo (Wolapük, Ido, Novlatin, Okcidental, Basic ktp) aŭ en la naciaj lingvoj pri iu sistemo de mondhelplingvo.

Nia lando klopodu, ke ĉiu grupo kaj multaj lokoj estu en la adresaro! Havigu per tio al nia lando bonan propagandilon!

Korespondado

Kun ĉiuj landoj pri diversaj temoj per ilustritaj poŝtkartoj kaj leteroj volas korespondi samideano

Ching Shiung Chen

Shan Pin Road 118, Swatow (Ĉinujo)

Mi volas korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun legantoj de „Bulgara Esperantisto“. Adreso:

V. Rakauskas

Videniskiu p. ag., Varniškis, Litauen.

„La konservativa penso obstine asertas, ke Esperanto estas utopio. La vivanta, sisteme disvolviĝanta realeco ĉiam pli kaj pli kuraĝe refutas la opinion de la konservativuloj“.

M Gorkij

Enlanda kroniko

Gorna-Orehovica. La societo de la stacia kvartalo kaj vilaĝo Kalfinec rekomencis sian agadon por la asocia 1932/33 jaro. Ĝi malfermis superan kurson, kiun gvidas nia sindonema samideano Jordan Stanev

Sofia. La junula abstinenca societo „USTREM“ 2. sekcio, kvartalo Juĉbunar, malfermis kurson por komencantoj. La kursanoj estas 50.

Gvidanto Georgi Zahariev. La gekursanoj deziras korespondi kun novaj gesamideanoj. Adreso: N. M. Klinzurov str. Morava 72 — Sofio.

Sevlievo. Je la 20 a de Julio, Sevlieva Esperantista Societo „Frattiga Stelo“ malfermis kurson. La kurso (laŭ la parola metodo) estis gvidata de s-ano Simeon St. Hesapĉiev. Li uzis siajn sperton kaj lertecon kaj la rezultatoj estis brilaj. Ĉiuj kursanoj (inter kiuj estis doktoro, instruistoj kaj gelernantoj) finis la kurson bonsukcese. Ĉe la ekzameno oni aranĝis amuzvesperon, kies humorajojn, deklamojn kaj kantojn plenumis tre lerte la gekursanoj. La publiko entuziasme akklamis kiel la gekursanojn tiel ankaŭ la kuraĝan lektoron.

Tiele ni agas, laŭ niaj modestaj fortoj, en la profunda provinco.

Sciigas Doĉo T. Stanev.

Sviŝtov. Ĉe la komerca gimnazio gvidas kurson por komencantoj nia vigla samideano Koljo Petrov. Partoprenas 50—60 personoj.

Varna. Ĉe la komerca gimnazio s-ano Sapungiev faris prelegon pri

Esperanto kaj nun la sama gvidas kurson.

La sama faris prelegon ankaŭ ĉe la „Hejmo por militorfoj“. Kurson gvidos tie s-ano Dolapĉiev. Baldaŭ s-to „Albatro“ malfermos kursojn por ĝenerala publiko kaj por fervojistoj.

Nia redaktoro esprimas sian profundan dankon al la gesamideanoj kiuj gastigis lin ĉe si aŭ per io ajn priservis lin.

Komencis aperi nova monata gazeto „Fratego“. La jarabono estas 10 lv. Presas la eldonejo de la bulgarlingva periodaĵo „Bratstvo“ en Sevlievo dum lia propaganda vojaĝo.

Dum Julio vizitis nian landon samideano Hans Harder el Meissen (Germanujo), kiu veturis per motociklo. Li vizitis kelkajn bulgarajn urbojn kaj kunportis bonegajn impresojn pri niaj preskaŭ nekonataj lando kaj popolo. Antaŭe li aŭdis, ke Bulgarujo estas lando de preskaŭ sovaĝa kaj rabista popolo!

Li speciale admiris pri nia tre fruktodona tero, kiu ĉion produktas kaj faris multajn fotojn por poste ilin proekcii en publikaj paroladoj. Jen kiel Esperanto servas!

Ges-roj Guinaud, niaj gesamideanoj el Parizo (Seine et Oise) vizitis Bulgarujon dum junio kaj montris specialan intereson al la popolaj moroj kaj kutimoj kaj popola vivo. Forlasante Bulgarujon ili sendis salutojn al ĉuj bulgaraj geesperantistoj.

Движението въ чужбина

Чехословашкото министерство на търговията и индустрията решило да отпусне на чехословашкия Esperantски съюз 5.000 крони (около 20 000 лв.) за турист-

ска пропаганда на Чехословашко въ чужбина.

Петият международен конгресъ по електриката следъ като изслушалъ доклада на познатия

голѣмъ есперантистъ д-ръ Вюстеръ, решилъ да въведе Есперанто въ употреба за своитѣ цели, като смѣта, че чрезъ него международнитѣ електро-термини ще могатъ да се уеднаквятъ най-добре.

5-ятъ полски есперантски конгресъ е станалъ на 30—31 X. и 1 XI въ историческия полски градъ Ljublin.

Въ Issy-les Monlineaux (Франция) градския съветъ решилъ да нарече една улица на името на Заменхофъ. Преди 2 години същиятъ нарекълъ една улица на

Дюплоайе — изобретателъ на най-много употребяваната въ Франция стенографна система, приложена и на Есперанто.

Стенографенъ конкурсъ е билъ устроенъ въ Парижъ по време на 24-ия международенъ есперантски конгресъ. Участвували 47 лица отъ 9 страни и сж раздадени нѣколко премии.

Виенската дирекция на железницитѣ е открила курсъ за желѣзничари подъ ръководството на познатия голѣмъ есперантистъ Хуго Щайнеръ.

El ĉiuj lokoj kaj epokoj

La antikvaj popoloj personigis kaj digis la tempon. Ili imagis ĝin kiel maljunulon kun longa blanka barbo. Li havas fortajn kaj grandajn flugilojn, kiuj simbolas la rapidecon de la tempo kaj falĉilon — tio estas la granda detrua forto de la tempo. Iuj je oni prezentis lin, tenantan sablujon (sablajn horloĝon), kiu estas emblemato de la rapida forkurado de la jaroj.

La antikva greka insula urbo Kalimnos havis 365 preĝejojn de diversaj stiloj kaj grandeco. En ĉiu el ili oni diservis en diversaj tagoj de la jaro kaj en eksterordinaraj okazoj—en la katedralo. La lasta ĝis nun ankoraŭ vidigas siajn belajn gotikajn arkitekturajn, kvankam en la 15-a jarcento italoj detruis la urbon.

La Pariza subtera fervojo nun estas nomata en franca lingvo „métro“. Ĝi estas mallongigo de la formo „métropolitain (chemin de fer)“ — ĉefurba (fervojo). La formo métropolitain estas adjektivo de „metropolis“ (greke mēter—patrino kaj polis—urbo). De la subtera fervojo de Parizo portas sian nomon de vorto signifanta „patrino“ kaj nur tiu ĉi

ligo ekzistas inter ambaŭ vortoj.

La ĉina lingvo estas unusilaba. Ĉiu silabo sangas sian gramatikan signifon, sangante sian lokon en la frazo kaj laŭ la tono. La ĉina skribo devenas de 214 slojiloj aŭ radikoj kaj laŭ ili oni komprenas la kategorion de la aĵoj kaj ideoj. Se oni trovas en la linio de la skribo la slojilon № 10 oni scias, ke temas pri homo, homeco k.t.p. Oni distingas: lingvon sciencan (de la mandarenaj) kaj popolan. La riĉega ĉina literaturo entenas 1 e kanonlibrojn; 2 e historiajn librojn inter kiuj estas la oficiala Sse K; 3 e librojn sciencajn kaj filozofiajn; 4 e literaturaĵojn (teatraĵojn, poeziojn, romanojn).

Fotojn de la societoj kaj grupoj ni presigos ĉiam bonvole en „Bulgara Esperantisto“. La societoj estas petataj sendi bonajn fotojn kaj ĉiam aldoni klarigojn. Tiamaniere dum la tuta jaro ni havos eblon vidi sur la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“ ĉiujn samideanojn kiuj laboras por Esperanto en la diversaj anguloj de nia lando.

Amuzo kaj ŝerco

Angla reĝo renkontas jongliston kaj intertraktas por aĉeti lian ĉevalon.

— Ĉu vi vendus al mi vian ĉevalon? — demandas la reĝo.

— Jes, via moŝto, bonvole mi vendus anstataŭ donaci ĝin al mi.

— Je kia prezo?

— Je tia, je kia ĝi estos vendita.

— Kaj je kia prezo vi vendos ĝin? Je tia, kiom vi donos al mi.

— Kaj kiom mi ricevos?

— Tiom, kiom mi ricevos.

— Ĉu ĝi estas juna?

— Jes, ĝi ne estas maljuna: ĝi neniam razis sin.

— Ĉu ĝi manĝas bone?

— Jes, bona, kaj bela Sinjoro: dum unu tago ĝi formanĝas pli multe da aveno, ol Vi povus formanĝi dum tuta semajno.

— Ĉu ĝi trinkas bone!

— Jes. Via moŝto, mi juras je Sankta Leonardo: je unu fojo ĝi fortrinkas pli multe da akvo, ol Vi trinkas dum tuta semajno.

— Kaj ĉu ĝi kuras bone kaj rapide?

— Pri tio eĉ ne estas necese demandi: ĝis mi enirus sur la straton ĝia kapo jam antaŭirus la voston.

— Diru al mi, amiko, ĉu ĝi marŝas kviete?

— Por diri la veron al Via moŝto, kuŝante en sia litto, oni povas esperi ripozon pli multe, ol rajdante mian ĉevalon.

— Ĉu ĝi ne havas iujn malsanojn.

— Ĝis nun ĝi plendis pri sia malforteco nek al mi, nek al iu alia.

— Karulo, kiaj estas ĝiaj kruroj? Ĉu vi provis ilin.

— Mi nek provis, nek gustumis ilin.

— Ĉu ĝia lango estas bela?

— Jes, mi opinias, ke pli bonan oni ne trovas de tie ĉi ĝis Lyon: neniam ĝis nun ĝi mensogis aŭ insultis.

— Kial do, vi ĉiam respondas kontraŭe? Kia fierulo vi estas kaj kiaj estas tiuj ĉi viaj kutimoj?

— Ni estas multaj kamaradoj kaj ni estas tiaj knaboj, ke ni volonte iras tien, kien ni estas invititaj kaj pli ĝoje — tien, kie oni kuŝas malbone. Ni ne frandas kaj ne avidas al mono: ni formanĝas dum unu tago ĉion, kion ni perlaboris dum monato.

*)En la mezepoko (mezaj jarcentoj) ekzistis multe da similaj fabeloj, en kluj la verkintoj (jonglistoj k. a.) priridis la ekleziulojn monahojn, pastrojn, k. t. p. Multfoje tiuj ĉi fabeloj estas cinikaj. Tie ĉi „jonglisto“ havas la specialan sencon de verkanto de similaj fabeloj (franc-lingve, fableu).

FELIĈA EDZO

Ŝi. — S-ro, donu al mi unu kolumon por mia edzo, mi petas.

Vendisto — Kia numero s-rino.

Ŝi — Mi forgesis, s-ro, sed se mi faras tiel per miaj manoj (ŝi ĉirkaŭpenas lin) tiom dika estas la kolo de mia edzo.

El la redakcio

Kelkaj pasintjaraj abonantoj ne ricevis „Bulgara Esperantisto“-n pro manko de numeroj. Ili estu tran- kvilaj: la sumojn ni transigis por la kuranta abonjaro. Multaj el la pasin-

tjaraj abonantoj tute ne pagis la abo- non.. Ili komprenu, ke nek la presisto presas senpage, nek la poŝto senpa- ge ekspedas.

La korespondantoj estas peta-

taj skribi legeble (se eble sur skribmaŝino) kaj regule informi la redakcion pri ĉio el la movado.

Dum tiu ĉi redakcia jaro ni subtenos la jenajn fakojn en nia gazeto pri: litereturo kaj poezio, pri lingvaj studoj kaj organizaj demandoj, (la legantoj povas demandi pri diversaj lingvaĵoj kaj la pli gravajn ni respondos en la gazeto). Ni prizorgos ankaŭ la fakojn: „Amuzo kaj serĉo“, „El ĉiuj lokoj kaj epokoj“, fakojn pri enlanda kaj eksterlanda esperantista movado, pri

muziko kaj ni malfermas novan fakon pri „turismo“ Pri ĉiu aparta fako la korespondantoj skribu sur aparta folio. Estimante la opinion de la legantoj, ni malfermos ankaŭ fakon, kie ili povas elmontri siajn pensojn kaj ideojn pri demandoj de ĝenerala karaktero.

Tiu ĉi duobla numero malfruiĝis pro la longa foresto de nia redaktoro. Ni petas pardonon de la abonantoj.

Al K. G. en S. La ricevita kunlaboraĵo plaĉas al ni. Sendu aliajn

Есперантисти, доставете си библиотека

«NOVA KULTURO»

веститель на новата култура на миръ, братство и любовъ между хората по цѣлата земя

ГОДИНА ПЪРВА (I) — 10 номера лева 40

Сжщата ПОДВЪРЗАНА 60

ГОДИНА ВТОРА (II) — 10 номера плусъ „Religio-filozofia vivkoncepto de Petro Danov“ 50

Сжщата ПОДВЪРЗАНА 70

La tri fundamentoj de la vivo, kun aldono „Bildoj de la vivo el la Blanka Frataro en Bulgarujo“ kaj ilustraĵoj 15

Fir-Für-Fen, unu el la kantoj de la Blanka Frataro, notita 3

Абохирайте се за:

Библиотека „Nova Kulturo“, година трета (III), 10 номера 50

Frateco, monata gazeto por frateca vivo. La unua numero ĵus aperis. *Годишенъ абонаментъ само* 10

Адресъ: *Атанасъ Николовъ*, пощенска кутия 6—Бургазъ